

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA  
kaj de PATRONA ASOCIO "LEXICON SILVESTRE" R.A.

Nr. 58 Eberswalde, 2010-04-15

(Esperanta versio - el la germana esperantigis d-ro Detlev Blanke & Ingward Ullrich)

## Novaj publikaĵoj de la Patrona Asocio Lexicon silvestre



Titolo: **NOMENKLATURO DE LA FORSTA LIGNECA FLAŬRO DE EŬROPO**

Subtitolo: Nomenklatur de la forsta ligneca Flaŭro de Eŭropo en kvin lingvoj (Latina-Germana-Engla-Esperanta-Franca)

Aŭtoro: Ingward Ullrich

Eldonisto: Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e. V. Eberswalde 2009

ISBN: 978-3-931262-67-9

Eldono: 3a pliampleksigita eldono

Paĝoj: 225

Prezo: 25,00 Euro (UVP)



Titolo: **LEXICON SILVESTRE PRIMA PARS**

Subtitolo: Vortaro de forsta fako en tri lingvoj (Esperanta-Germana-Pola)

Eldonisto: Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e. V. Eberswalde 2009

ISBN: 978-3-931262-66-2

Eldono: 1a Eldono

Paĝoj: 358

Prezo: 27,50 Euro (UVP)

## La planlingvo Esperanto kiel faklingvo<sup>1</sup>

Wera Blanke<sup>2</sup>

Planlingvoj<sup>3</sup> estas rezultoj de konscia kaj celdirektita lingva kreado kaj pro tio povas esti rigardataj produkto de lingvo-planado. Tion substrekas ankaŭ la specialisto pri lingvo-planado Valter Tauli. Sub lingvo-plando li komprenas „*the methodical activity of regulating and improving existing languages or creating new common regional, national or international languages*” (Tauli 1968: 27)<sup>4</sup>.

Por la esploro de faklingvoj planlingvoj estas interesaj almenaŭ pro tri kialoj:

- a) Planlingvoj ofte estas esprimoj de serĉado de raciaj kaj precizaj lingvaj esprimiloj. Planlingvoj donis impulsojn por la evoluigo de faklingvoj resp. de la terminologioscienco.
- b) Planlingvoj ludis resp. ludas certan rolon kiel rimedo de internacia faklingva komunikado.
- c) Al etnaj lingvoj kaj planlingvoj, se ili evoluigis faklingvojn, komunas la bezono de kvalit-kriterioj por terminoj kaj terminologioj, la neceso de terminologia normigado kaj planado kaj de ties praktika organizado.

Oni krome povas observi klopodojn procedi de la kolektado kaj dokumentado, de esplorado kaj formado de teorioj, al perado de scioj kaj trejnado kaj al la aplikado de modernaj datum-prilaboraj sistemoj (i.a. elektronikaj terminologiaj bankoj).

Sed ĉar planlingvoj ĝis nun apenaŭ respondas al socie gravaj kaj iom grandaj bezonoj je komunikado, la plej multaj de la ĝis nun ekzistantaj faklingvaj rezultoj (preskaŭ nur en Esperanto) estas ĉefe la produkto de socie apenaŭ subtenitaj privataj klopodoj.

### Fakteksto kaj fakleksiko

En Esperanto (Zamenhof 1887), kiu estas aglutina lingvo kun ĉefe romana leksiko kaj produktiva vortkrea sistemo, aperis popularsciencaj tekstoj (medicino kaj astronomio) jam en la unua normdona kolekto de modeltekstoj, en la “Fundamenta Krestomatio” (Zamenhof 1903/1992). Fakteksto aperadas – en malgrandaj fakrevuoj kaj bultenoj de malsama kvalito – por jenaj fakoj<sup>5</sup>:

*Ateismo, konstruado, fervojo, forstfako, interlingvistiko kaj esperantologio, ĵurnalismo, juro, medicino, muziko, natura kuracado, ekologio, ekonomio, ekumeno, ornitologio, pedagogio, filatelo, filozofio, poŝto kaj telekomunikado, radio-amatoroj, lingvo-politiko, lingvaj minoritatoj, teologio kaj diversaj religioj, scienco (interdiscipline), vegetarismo.*

Gravan se ankaŭ parte tempe limigitan rolon en la fiksado de faklingvaj tekstoj ludis, resp. ankoraŭ ludas (krom la fama *Scienca Revuo* ekde 1904)<sup>6</sup>, i.a. jenaj revuoj:

- *Medicina Internacia Revuo* (1910-1911, 1923-36, 1952-)
- *Internacia Pedagogia Revuo* (1908-1922, 1927-1939, 1956-1959, 1970-)
- *Homo kaj Kosmo* (astronomio, 1963-1987)
- *Esperantologio* (1949-1955, 1959-1961)
- *Internacia Geografia Revuo* (1956-1964)
- *Kemio Internacia* (1965-1968)
- *Internacia Komputado/Fokuso* (1983-1988)
- *Planlingvistiko* (1981-1986)
- *Scienca Mondo* (scienco-politiko, 1976-1989)
- *Sciencaj Komunikadoj* (1975-1986)

<sup>1</sup> Kunaŭtoro de la teksto estas Detlev Blanke. La germana teksto aperis en Wera Blanke 2008:13-26. Ĝi estas koncizigita, aktualigita kaj esperantigita de D. Blanke.

<sup>2</sup> Wera Blanke (\*1933), Berlin, okupiĝis ekde 1979 pri la principoj de kreado de fakvortoj en Esperanto; laboris i.a. pri planlingvaj impulsoj je la estiĝo de la terminologio-scienco; iniciatis en 1985 la Terminologian Esperanto-Centron de Universala Esperanto-Asocio (TEC, Rotterdam); ofte prelegis kaj publikigis precipe en la germana kaj en Esperanto; en 2006, laŭ sugesto de la Internacia Informcentro pri Terminologio (Infoterm, Vieno), distingiĝis per la “Speciala Premio Eugen-Wüster”.

<sup>3</sup> Pri planlingvoj vidu la monografion de D. Blanke (1985) kaj la tie menciitan literaturon.

<sup>4</sup> [...] li komprenas “la metodikan aktivadon por regulado kaj plibonigo de ekzistantaj lingvoj aŭ la kreadon de novaj komunaj regionaj, naciaj aŭ internaciaj lingvoj”.

<sup>5</sup> La vicigo sekvas la germanan originalon, kiu estas ordigita laŭ la germana alfabeto.

<sup>6</sup> La periodaĵo *Internacia Scienca Revuo* ekde 1904 aperadas kun interrompoj kaj iom ŝanĝiĝintaj titoloj. Bibliografio, listiganta la artikolojn de la revuo de 1949-2000 indikas 46 fakojn, laŭ <http://www.eventoj.hu/isa/scienca-revuo/enhavo-1949-2000.htm> (28.08.2010).

- *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj* (en la ĉina lingvo kaj en Esperanto, 1985-1995) (kp. ankaŭ Yzal 1992).

Lastatempe aperis kelkaj revuoj en la Interreto: *Teleskopo* publikigas sciencajn tekstojn el diversaj fakoj.<sup>7</sup> Interlingvistikajn kaj esperantologiajn tekstojn publikigas ekde 1999 *Esperantologio – Esperanto studies*, de kiu ankaŭ ekzistas printeldono.<sup>8</sup> Ekde 2005 brazilanoj eldonas la *Interlingvistikan Revuon*.<sup>9</sup> La svedo Bertil Wennergren redaktas ekde 2006 la enhave riĉan retrevuon *Lingva Kritiko*.<sup>10</sup>

Kelkaj etnolingvaj fakrevuoj foje ankaŭ entenas kontribuojn resp. resumojn en la planlingvo, ekz. la lingvopolitika revuo *Language Problems & Language Planning* kaj la kibernetike-pedagogie orientita revuo *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/ Humankybernetik* (ekde 1977).

En la lasta presita eldono de la *libro-katalogo* de Universala Esperanto-Asocio (Esperanto-Katalogo 2001) oni trovas diversampleksajn presitajn tekstojn pri jenaj fakoj:

*Arkeologio, astronomio, abelbredado, biologio, botaniko, kemio, etnografio, geografio, geologio, historiografio, informadiko, higieno, ĵurnalismo, kuirarto, kibernetiko, hidromekaniko, interlingvistiko kaj esperantologio, juro, lingvistiko, matematiko, medicino, meteorologio, ekologio, ekonomio, pedagogio, filozofio, politikscienco, psikologio, sociologio, sporto, stenografio, telekomunikado, teologio (kaj religiaj filozofioj), trafiko, zoologio.*

Ĉiujare aldoniĝas ĉ. 20-30 fakaj monografioj.<sup>11</sup>

En la daŭre aktualigata *reta eldono de la libro-katalogo* de UEA<sup>12</sup> oni trovas jenan kvanton da titoloj laŭ la rubrikoj:

Filozofio:	141
Geografio	114
Historio	82
Lingvistiko	463
Religio	264
Scienco kaj Tekniko	313

Ekzistas malsamaj informoj pri la kvanto de *fakaj terminaroj*. Edward Ockey ĝis 1980 mencias 200 laŭ kvalito kaj amplekso tre malsamajn fakvortarojn por ĉ. 50 fakoj (Ockey 1982). La liston ĝis 2002 aktualigis Geoffrey Sutton, kiu mencias 280 fakvortarojn por ĉ. 70 fakoj (kp. Ockey/Sutton 2002, krome la unuan ĉi-rilatan superrigardon de Haupenthal 1991). Alia reta bibliografio por 1980-2000 mencias 188 fakvortarojn por 88 fakoj<sup>13</sup>. Ankaŭ la ĝis nun plej ampleksa unulingva klariga vortaro de Esperanto, la *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* entenas fakleksikon el 73 scio-kampoj (kp. Waringhien/Duc Goninaz 2005: 36-37). La enhave verŝajne eĉ pli riĉa vortaro Esperanto-Germana de Krause entenas leksikon el 86 kampoj (Krause 1999). Por same 86 kampoj lia vortarego Deutsch-Esperanto registras la esperantajn ekvivalentojn por germanaj nocioj (Krause 2007).

Ne supertaksenda por la evoluo de la faklingva komunikado estas la korespondado inter fakuloj, kio grave plifaciliĝis per la Interreto. Ekzistas fakaj diskutgrupoj kaj sennombraj individuaj kontaktoj.

La *Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio* (McCoy 2010) entenas ĉ. 2000 adresojn de fake malsame orientitaj parolantoj de Esperanto el 101 landoj, kiuj peras kontaktojn pri pli ol 450 temoj (McCoy 2010: 100 ks.). Ankaŭ la Esperanto-Versio de *Wikipedia* (Vikipedio) entenas artikolojn pri diversaj fakoj. Fine de aŭgusto 2010 la esperanta *Vikipedio* entenis pli ol 130 000 artikolojn.<sup>14</sup> Krom tio pli kaj pli ofte oni enretigas faktekstojn.<sup>15</sup>

<sup>7</sup> <http://www.teleskopo.com/index.htm> (28.08.10).

<sup>8</sup> <http://www.math.uu.se/esperanto/> (28.08.10).

<sup>9</sup> [http://leitejr\\_sites.uol.com.br/esperanto/itr200707.pdf](http://leitejr_sites.uol.com.br/esperanto/itr200707.pdf) (28.08.10).

<sup>10</sup> <http://lingvakritiko.com/2010/04/> (28.08.10).

<sup>11</sup> Kp. la rubrikon „Laste aperis...“ en la revuo *Esperanto*, Rotterdam.

<sup>12</sup> <http://katalogo.uea.org> (28.08.10).

<sup>13</sup> Kp. [www.uea.org/dokumentoj/terminaroj\\_ekde\\_1980.html](http://www.uea.org/dokumentoj/terminaroj_ekde_1980.html) (28.08.10).

<sup>14</sup> La 24-an de aŭgusto 2010: 133 331 artikoloj laŭ <http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:%C4%88efpa%C4%9Do>.

<sup>15</sup> Vidu la *Scienc-Teknikan Esperanto-Bibliotekon*, STEB: [www.eventoj.hu/steb/](http://www.eventoj.hu/steb/) (28.08.2010).

## Fakaj organizaĵoj kaj aranĝoj

La internacia faka komunikado en Esperanto realiĝas, malsamintense, precipe en la kadro de kelkaj fakaj organizaĵoj kaj aliaj grupiĝoj. Al tiuj apartenas (ordigitaj laŭ fondo-jaro):

- *Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE, fondita 1906, interdisciplina asocio)*
- *Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA, fond.1908)*
- *Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA, fond. 1908)*
- *Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF, fond. 1909)*
- *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE, fond. 1910)*
- *Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI, fond. 1911)*
- *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI, fond.1949)*
- *Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (P.T.T., fond. 1966)*
- *Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj (ILERA, fond. 1970)*
- *Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IAdEM, fond. 1974)*
- *Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL, fond. 1978)*
- *Internacia Forstista Rondo Esperantista (IFRE, fond. 1981)*
- *Filozofia Asocio Tutmonda (FAT, fond. 1983)*
- *Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS, fond. 1983)*
- *Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF, fond.1985)*
- *Internacia Naturkuraca Asocio (INA, fond. 1986)*
- *Esperanta Jura Asocio (EJA, fond. 1989)*
- *Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj (ASISTI, fond. 1989)*
- *Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE, fond. 1993)*
- *Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio (IAEA, fond. 1996)*
- *Edukado@Interreto (E@I, fond. 2001)*

Granda parto de la menciitaj organizaĵoj disponas pri propra retpaĝaro.<sup>16</sup>

Ekzistas akademias institucioj kun la celo subteni la interdisciplinan interŝanĝon. Al ili apartenas la *Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino (AIS, fond. 1985, kp. Frank 1993: 910 ks.)* kaj la *Internacia Scienca Akademio Comenius* (kp. Neergaard/Kiselman 1992: p. III ks.). Internaciajn fakajn kontaktojn ankaŭ helpas informlibroj pri sciencistoj, kiuj publikigas en Esperanto resp. estas aktivaj en la planlingvo (kp. Darbellay 1981; Fössmeier/Tuĥvatullina 2005).

Tiuj kaj aliaj fake orientitaj organizaĵoj, institucioj kaj grupiĝoj kutime organizas siajn kunvenojn kadre de la *Universalaj Kongresoj de Esperanto*, kiuj okazas jare en alia lando (ĝenerale kun 1000 ĝis 3000, foje eĉ ĝis 6000 parolantoj el 60-70 landoj). Kelkaj organizaĵoj regule havas proprajn fakajn konferencojn kaj alitipajn aranĝojn. Tio validas precipe por la *fervojistoj* (jaraj kongresoj), *medicinistoj* (ekde 1977 kongreso ĉiun duan jaron), *interlingvistoj* kaj *esperantologoj* (ĉiujare kelkaj internaciaj kaj naciaj aranĝoj), *informadikistoj*, *komputikistoj* kaj *kibernetikistoj*, *pedagogoj* (ĉiujare konferencoj) kaj diversaj *religiaj grupiĝoj*.

Ankaŭ popularsciencaj aranĝoj kontribuas al la estiĝo de faktekstoj kaj la fiksiĝo de fakaj leksikoj. Ekzemploj estas la sesioj de la *Internacia Kongresa Universitato* kadre de la *Universala Kongreso (Wandel 2010)*. Ankaŭ konatiĝis kelkaj aliaj *Someraj Universitatoj* (ekz. 1963-1990 en Gyula/Hungario; de 1980 ĝis meze de 1990-aj jaroj en Veliko Tirnovo/Bulgario) kaj la *Universitataj Someraj Kursoj 1972-1980* en Liège/Belgio kun pli ol 30 prelego-tekstoj, i.a. pri anatomio, biologio, kemio, literaturscienco, matematiko, farmakologio, psikologio, sociologio, lingvistiko kaj zoologio (kp. D.Blanke 1986:82). Aparte grava estas la prelegoserio kun la nomo *Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko* en ĈSSR kun la mallongigo AEST (1978-1989). La unuopaj konferencoj estis dediĉitaj al elektitaj temoj (ĉiam kun la dua ĉeftemo "Esperanto kiel faklingvo"). La 6 volumoj de tiu unua serio entenas 156 studojn. La serion ekde 1998 kiel *Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*, kun la mallongigo KAEST, daŭrigis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun la entrepreno KAVA-PECH en dujara ritmo (kp. Chrdle 2010). Ankaŭ de tiuj konferencoj aperis la aktoj.<sup>17</sup> La serio ekde 2010 estas daŭrigata en Slovakio. Simila serio de sciencteknikaj aranĝoj en 1987 estis lanĉita en Ĉinio kaj ekde 2008 en Bulgario (Karlovo).

En kelkaj neesperantistaj fakaj konferencoj Esperanto estis foje uzata kiel samrajta konferenca

<sup>16</sup> Kp. <http://www.esperanto.net/veb/org.html> kaj [http://www.uea.org/agadoj/faka\\_agado.html](http://www.uea.org/agadoj/faka_agado.html) (28.08.10).

<sup>17</sup> Kp. Malovec 1999, Pluhař 2001, 2003, 2005, 2007 kaj 2009).

lingvo, ekz. ekde 1968 de geologoj (ĝis nun 10 konferencaj volumoj) kaj dum la 1980aj jaroj de kibernetikistoj en Namur (Belgio). La internacia faka konferenco *Interkomputo* en 1982 (Budapest) okazis komplete en Esperanto kaj kunigis 200 komputikistojn el 19 landoj. Iliaj pli ol 100 prelegoj aperis en 6 volumoj. En la internacia konferenco, kiu okazis en 1985 en Budapeŝto, de entute 45 prelegoj 17 estis prezentitaj en Esperanto. La kongresmaterialoj aperis.

### **Pri la farado de terminoj: Antaŭkondiĉoj kaj procedoj**

Siaj lingvostrukturaj ecoj taŭgigas Esperanton kiel rimedon de faka komunikado. Tion jam montris la fondinto de la terminologio-scienco, la aŭstro Eugen Wüster (1889-1977) en siaj fundamentaj verkoj (1931/1970: 294 ks.). Al tiuj ecoj apartenas la facila kunligiĝemo de morfemoj (i.a. pro la konvena silaba strukturo, la manko de morfemŝanĝoj k.s.), la plene produktiva afiksa sistemo kaj tre kreeme aplikeblaj vortfaraj reguloj.

Tiuj ecoj ebligas la adaptiĝon de la lingvo al novaj komunikaj bezonoj kaj faras ĝin taŭga por celoj de aŭtomata faklingva dokumentado, kiel pruvis la planlingva esplora kaj dialoga sistemo *PREDIS* (kp. Stoppoloni 1982). Tio ankaŭ validas por la aŭtomata tradukado. La duonaŭtomata traduksistemo *Distributed Language Translation* (DLT), iniciatita de Toon Witkam (1983) en kiu iomete modifita Esperanto funkcias kiel pontolingvo, povis esti evoluigita ĝis prototipa matureco (kp. Sadler 1991; Schubert 1999).

Por la nomado de terminoj servas ĉefe jenaj procedoj:

- Terminigo de ĝenerallingvaj vortoj: *funkcio* (ĝenerallingvaĵo kaj ankaŭ fakvorto, ekz. de la matematiko)
- Pruntaĵoj el fremdaj lingvoj: *softvaro*, *sputniko*
- Kalkeo: *sin-mort-igo* (de la novlatina *sui/cid/um* aŭ la germana *Selbst/töt/ung*)
- Metaforaj formoj: *elektra kampo*.

La ĉefaj procedoj ĉe la formado de neologismoj estas kalkeado kaj pruntado de kunmetkapablaj morfemoj el aliaj lingvoj. Tio foje kreas sinonimojn: *rul/ŝtup/ar/o* kaj *eskalator/o* por la germana 'Rolltreppe', angle 'escalator'.

Siatempo konkuris *komput/il/o*, *komputer/o* kaj *komputor/o*. Venkis 'komputilo'.

Diversaj postuloj al termino foje sin kompletigas aŭ reciproke eliminis (kp. D. Blanke 1986:51 ks; Dehler 1985: 83 ks.). Al tiuj postuloj apartenas i.a.:

- *ligo al fako*
- *ligo al sistemo*
- *la bazo de termino estu nocio*
- *laŭbezone elektebla precizeco*
- *unusignifeco*
- *signifo-klariga strukturo*
- *koncizeco*

Aldoniĝas postuloj, specifaj por Esperanto, kiel *internacieco* kaj *sistem-kongruo* (= kongruo kun la 'Fundamento de Esperanto', la sistem-dokumento de Esperanto, kodigita en 1905).

Terminoj en Esperanto ĝis nun preskaŭ ĉiam baziĝas je individuaj nomigo-proponoj, aperintaj en tekstoj aŭ vortaroj, diskutitaj, elprovitaj en la praktiko kaj fine akceptitaj en la lingvo. Fine de la 1980aj, komence de la 1990aj jaroj Rüdiger Eichholz konatigis la metodon de internacia terminologia diskutado helpe de komputiloj kaj interŝanĝo de diskedoj, kies rezultoj registriĝis en la ampleksa verko *Pekoteko* (kp. Eichholz 1992). Tiun metodon anstataŭis la multe pli oportuna kaj efika diskutado per la Interreto.

### **Terminologia laboro: provoj de kunordigado**

Jam en 1911 unuan fojon oni elaboris principojn por la kreado de fakvortoj en Esperanto (Rollet de l' Isle 1911; Verax 1911/1912). Dum la 1950aj jaroj la terminologiaj centroj de *Internacia Scienca Asocio Esperantista* kaj de la *Akademio de Esperanto*, la lingvokultura instanco de la planlingvo, klopodis progresi kaj akceli la terminologian laboron surbaze de la ekkonoj de la terminologio-scienco.

Por akiri ĉi-rilate pli bonajn rezultojn oni fondis en 1987 la *Terminologian Esperanto-Centron de Universala Esperanto-Asocio* (TEC/UEA Rotterdam)<sup>18</sup>, kiu kunlaboris kun *Infoterm*<sup>19</sup> kaj

<sup>18</sup> Pri la laboro kaj la rezultoj de TEC, la problemoj ligitaj al tio kaj la perspektivoj, kp. W. Blanke 1999.

<sup>19</sup> *Internationales Informationszentrum für Terminologie*, Wien.

*TermNet*, la monde gvidaj neesperantaj terminologiaj instancoj.<sup>20</sup> Kun rekta aŭ nereakta subteno de TEC estis organizitaj konferencoj kaj trejnseminarioj. Aperis instrumaterialoj, ekz. *Terminologia Kurso* kaj eseero de Jan Werner (Werner 1986; 2004) kaj gvidilo por la kreado de terminoj, la *Terminologia Gvidilo* (Suonuuti 1998).

En Esperanto (ofte kiel provtraduko) aperis kelkaj rekomendoj de la *Terminologia Komisiono de ISO* (TC 37), ekz. la *Recommendations R 639* (1967, *Symbols for languages, countries and authorities*), *R 704* (1968, *Naming principles*), *R 860* (1968, *International unification of concepts and terms*) kaj *R 1097* (1969, *Vocabulary of Terminology*). Dum la lasta jardeko oni trovas klopodojn plibonigi la terminologian laboron en la Interreto.<sup>21</sup>

La ĝisnunan praktikon de Esperanto, ankaŭ la fakaplikan, oni registras en specialaj bibliografioj, bibliotekoj kaj arkivoj (kp. Blanke 2006:124-126).

## Literaturo

- BLANKE, DETLEV (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin. Akademie-Verlag. 408 p.
- (1986): *Esperanto und Wissenschaft. Zur Plansprachenproblematik*. (Mit Beiträgen von Till Dahlenburg und Martin Schüler). Berlin: Kulturbund der DDR. (2. Eldono), 89 p.
- (2006): *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Struktur internationaler Plansprachen*. Redaktis Sabine Fiedler. Frankfurt/Main: Peter Lang, 405 p.
- ;ULRICH LINS (2010, Red.): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 901 p.
- BLANKE, WERA (1999): „La Terminologia Esperanto-Centro: Spertoj, problemoj, perspektivoj”. En: Malovec 1999: 140-147.
- (2008): *Esperanto – Terminologie und Terminologiearbeit*. New York: Mondial, 153 p.
- CHRDLE, PETR (2010): “SAEST kaj KAEST. Pri fakaplikaj aranĝoj en Ĉeĥio kaj Slovakio”. En: Blanke/Lins 2010:627-635.
- DARBELLAY, CHRISTIAN (1981): *Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko*. Neuss: Autor, 275 p.
- DEHLER, WERA (1985): „Terminologiaj principoj de Esperanto”. En: *der esperantist* 21: 83 - 89.
- EICHHOLZ, RÜDIGER (1986): *Terminologia Vortaro. Provtraduko de la Rekomendo R 1087 de ISO*. Bailieboro: esperanto press (Ontario/Kanado), 50 p.
- (1992): *Perkomputora termino-kolekto (Pekoteko). 1985-1990, Vol. I-III*. Bailieboro: esperanto press (Ontario, Kanado), 1816 p.
- ESPERANTO-KATALOGO = Libroservo de UEA (2001): *Esperanto-katalogo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 189 p.
- FÖSSMEIER, REINHARD; LIANA TUĤVATULLINA (2005, Eld.): *Internacia Sciencista Dokumentaro de la Akademio de la Sciencoj (AIS) San Marino* (5.eld.), San Marino: AIS, 325 p.
- FRANK, HELMAR (1993): „Die Internationale Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino”. En: Věra Barandovská-Frank (1993, Red.): *Kybernetische Pädagogik. Klerig-kibernetiko. Schriften 1973-1992 von Helmar Frank und Mitarbeitern*. Band 6. Bratislava: Esprima/ San Marino: AUPEP, p. 911-916.
- HAUPENTHAL, REINHARD (1991): „Lexikographie der Plansprachen”. En: Franz Josef Hausmann, Oskar Reichmann, Herbert Ernst Wiegand, Ladislav Zgusta (1991, Eld.): *Wörterbücher. Dictionaries. Dictionnaires. Ein internationales Handbuch zur Lexikographie. An International Encyclopedia of Lexicography. Encyclopédie internationale de lexicographie*. III. Volumo, Berlin-New York: de Gruyter, p. 3120 - 3137.
- (1999): *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. Hamburg, Buske, 882 p.
- KRAUSE, ERICH-DIETER (2007): *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto*. Hamburg: Buske, 1679 p.
- MALOVEC, MIROSLAV (1999, Red.): *Modernaj rimedoj de komunikado* (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko 1). Dobřichovice: KAVA-PECH, 193 p.

<sup>20</sup> *Terminology Network*, Wien.

<sup>21</sup> Vidu ekz. <http://esperanto.net/tec/> (24.08.10).

- MCCOY, ROY (2010, Red.): *Jarlibro 2010*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 286 p.
- NEERGAARD, PAUL; CHRISTER KISELMAN (1992, Eld.): *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius*. Vol. I. Pekino: Ĉina Esperanto-Ligo, 118 p.
- OCKEY, EDWARD (1982): *A Bibliography of Esperanto Dictionaries. Bibliografio de Vortaroj*. Banstead: Aŭtoro, 238 p.
- , SUTTON, GEOFFREY (2002): *Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto 1887-2002*: [www.uea.org/dokumentoj/bib/index.html](http://www.uea.org/dokumentoj/bib/index.html) (25.08.2010)
- PLUHAŘ, ZDENĚK (2001, Red.): *Fakaj aplikoj de Esperanto*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko 2). Dobřichovice: KAVA-PECH, 157 p.
- (2003, Red.): *Fakaj studoj en Esperanto*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko 3). Dobřichovice: KAVA-PECH, 145 p.
- (2005, Red.): *Fake pri Esperanto kaj Esperante pri sciencoj*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko 4), Dobřichovice: KAVA-PECH, 84 p.
- (2007, Red.): *Lingvo kaj Interreto kaj aliaj studoj*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko 5), Dobřichovice: KAVA-PECH, 134 p.
- (2009, Red.): *Esperanto - instrumento de fakuloj*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko 6), Dobřichovice: KAVA-PECH, 133 p.
- ROLLET DE L' ISLE, MAURICE (1911): *Konsilaro por la farado de la sciencaj kaj teknikaj vortoj*. Kötzschenbroda-Dresden, 78 p.
- SADLER, VICTOR (1991): "Machine Translation Project Reaches Watershed". En: *Language Problems & Language Planning*, 15, Nro 1: 78-83.
- SCHUBERT, KLAUS (1999): „DLT: Resuma raporto“. En: *Informilo por Interlingvistoj* 8, N-ro 28 (1/99): 1-3.
- STOPPOLONI, SILVIO (1982): "Plansprachliches Rechner-Dialogsystem (PREDIS). Pritakso kaj perspektivoj". En: Ilona Koutny (Red.): *Homa lingvo kaj komputilo. Prelegoj de Interkomputo*. Budapeŝto, p. 88-101.
- SUONUUTI, HEIDI (1998): *Terminologia gvidilo*. (El la angla tradukis Sabine Fiedler, redaktis Wera Blanke). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 37 p.
- TAULI, VALTER (1968): *Introduction to a theory of language planning*. Uppsala: Almqvist & Wiksells, 277p.
- Verax, Charles (1911/12): "Propono por Terminologiaj Fundamentaj Principoj por la Scienca Lingvo en Esperanto". *Oficiala Gazeto Esperantista*, 4: 378-382.
- WANDEL, AMRI (2010): "Du jardekoj de Internacia Kongresa Universitato". En: Blanke/Lins 2010: 636-643.
- WARINGHIEN, GASTON; DUC GONINAZ, MICHEL (2005, Red.) *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2005*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda (2-a kor. eldono), 1264 p.
- WERNER, JAN (1986): *Terminologia Kurso*. Roudnice nad Labem: Ĉeĥa Esperanto-Asocio/Sdružený Klub ROH, 88 p.
- (2004): *Terminologiaj konsideroj*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 179 p.
- WITKAM, TOON (1983): *DLT. Distributed Language Translation – A multilingual facility for videotext information networks*. Utrecht: Buro for Systeemontwikkeling, 370 p.
- WÜSTER, EUGEN (1931/1970): *Internationale Sprachnormung in der Technik besonders in der Elektrotechnik. Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung*. Berlin: VDI (Represo kun aktualigitaj aldonaj ĉapitroj: 2-a eldono Bonn: 1966; 3-a eldono Bonn: 1970), 507 p. + Tabeloj.
- YZAL, LUIS M. HERNANDEZ (1992): *Inventaro de planlingvaj periodaĵoj*. Saint Pau d'Ordal: Rondo Tákacz, 132 p.
- ZAMENHOF, LUDWIG, L. (= Dr. Esperanto) (1887): *Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch*. Warszawa: Gebethner & Wolff, 48 p.
- (1903/1992): *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto*. 18-a eldono, prinotita de Gaston Waringhien, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 446 p.

## Ni konatiĝu!

### D-ro Inĝ. Lubomír Blaško



S-ro Lubomír Blaško (\*1964), naskita en Poprad, slovaka teritorio de la tiama ĈSSR, vivas ekde 1988 en Eberswalde. Li regas la slovakon, ĉeĥan kaj germanan lingvojn parole kaj skribe, sed li ankaŭ povas interkompreniĝi senprobleme angle, ruse, kroate, kaj pole. Post la vizitado de la elementa lernejo (1970-79) kaj la gimnazio (1979-83) en Poprad li studis en la Teknika Universitato en Zvolen (1983-88) forstajn sciencojn kaj diplomiĝis 1988 per la temo *“Haŭlad-teknologio en la tradicia forstfaka mastrumado en Slovaka Ercmontaro”*. Oktobre 2009 li sukcese doktoriĝis, ankaŭ en Zvolen, ĉe la katedro pri Arbarekologio kaj Ĉaso per la disertacio *“Comparison of the game management in an old member state of the European Union and a new one and the influence of the wildlife on the production of the forest of the School Forest Administration in Eberswalde-Finowtal”*. S-ro Blaško estas patro de kvar infanoj, kiuj estas por li la plej grava vivoesenco. Li deĵoras en la Forstkanton-administracio Eberswalde kiel funkcia inĝeniero kaj estas okupita kiel privata docento en la Faka Altlernejo Eberswalde. Krom siaj hobiaj – ĉasado, tenisludado, piedpilkado, glaciĥokeo kaj akvosporto – s-ro Blaško ekde 1993 ankaŭ engaĝas sin por la laboro pri la Lexicon silvestre. Li prilaboras la slovaklingvan parton.

### D-ro Mgr. Inĝ. Stanisław Dunikowski



S-ro Stanisław Dunikowski (\*1925) naskiĝis en la vilaĝo Szymaniszki, situanta oriente de Łódź. Li devenas el forstista familio. 1951 li finis la studadon en la Agrara Universitato Varsovio kiel Mag. ing. de la forstmastrumado. En la jaro 1962 li doktoriĝis al Dr. rer. silv. kaj du jaroj pli poste li avancis al docento en la Forstfaka Instituto Varsovio (IBL), kie li jam estis okupita ekde 1949. S-ro Dunikowski, honorita pro multnombraj distingoj kaj Naciaj Premioj, estis multjara kunlaboranto en la sekcio Ekologio kaj Naturprotektado en IBL Tiun sekcion li mem estris 7 jarojn. El lia plumo devenas pli ol 80 publikaĵoj, ligitaj precipe kun la problemaro de la arbarmeteorologio kaj kontraŭlukto de arbarbruloj. S-ro Dunikowski estas rigardata unu de la plej gravaj ekspertoj ĉe la establo de la pola arbara monitorado-reto. Dank` al siaj elstaraj pol-, franc-, rus-kaj germanlingvaj konoj s-ro Dunikowski estas je la dispono al Lexicon silvestre kiel faka eksperto kaj lingvoscianta kunlaboranto ekde pli ol 20 jaroj. Li prilaboras la pol-lingvan parton de LS.

### Dipl.-Forstisto Ingward Ullrich



S-ro Ingward Ullrich (\*1931) studis forstajn sciencojn en la Forsta Fakultato Eberswalde de la Humboldt-Universitato Berlino. Dum pli ol 25 jaroj li estis okupita ĉe la Turingia Forstaranĝa Buroo en Weimar. Laste, ĝis sia emeritiĝo 1992, li estis sekci-estro pri Silvikulturo kaj Arbarprotektado en la Forstprovinc-administracio Turingio. S-ro Ullrich esperantiĝis 1967. Ekde 1981 li laboras kiel multŝatata lingvoeksperto ĉefe pri forst-terminologiaj demandoj en Esperanto. I. U. estas kunfondinto de Lexicon silvestre kaj li praktikis – laŭ sia funkcio kiel prezidanto de la Terminologia Komisiono de IFRE (Internacia Forstista Rondo Esperantlingva) – decidigan influon pri ĉiuj aferoj de nia leksikono. Ne sole publikaĵoj pri terminologia kaj forstfaka problemaro kaj tradukoj devenas el lia plumo. I. U. ankaŭ estas konata kiel aŭtoro de musikhistoria kaj porinfana literaturoj kaj kiel komponisto. Ni povas aserti, ke ni ne estus progresintaj ĝis tiu grado, kiun ni nun atingis rilate la prilaboradon de la Esperanta parto de LS, sen la engaĝo de s-ro Ullrich.

## PRES-INDIKAĴOJ

Kontaktadreso:	Eldonisto/Redaktoro:
Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e.V. Faka Alternejo Eberswalde D-ro Bernhard Götz Am Zainhammer 5 D-16225 Eberswalde Tel.: +49-3334-65 563 Fax: +49-3334-65 567 Email: <a href="mailto:kontakt@lexicon-silvestre.de">kontakt@lexicon-silvestre.de</a> Homepage: <a href="http://www.lexicon-silvestre.de">www.lexicon-silvestre.de</a>	Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e.V. Stefan Panka Joachimsthaler Str. 15a D-16230 Britz Tel: +49-3334-255 228 Email: <a href="mailto:s.panka@lexicon-silvestre.de">s.panka@lexicon-silvestre.de</a>